

ESPERANTO PROVENCE

Numéro 80 - Avril 2010

4 numéros par an

Vorto de la Prezidanto

Post sukcesa semajno en Agay, kiun majstre organizis la grupo de Saint-Raphael, staras antaŭ ni plia laboro: vivi pli aktive nian regionon, informi larĝskale la homojn. Plej ofte la homoj ne scias pri la rolo kaj utilo de esperanto por kultura identeco aŭ savo de lingvoj kaj kulturoj, nuntempe formangataj de potenco nacia lingvo. Kie egaleco? Kie homaj rajtoj? 2010 estas deklarita de UNESKO «Jaro de Alproksimigo de Kulturoj», Esperanto helpas al tio.

Por informi, bela okazo estas la surstrata enketo, kiun Esperanto-France proponas: ĉiuj el vi povas kontribui;

dum vi atendas ĉe stacidomo, aŭtobus-stacio, ĉe kuracisto, surstrate, sur la bazaro, okaze de vilaĝa festo, ĉiuokaze, sole aŭ ope, alparolu la homojn. Vi kreas okazon pluinformi. Se vi sentas intereson, pludiskutu.

Por esti forta, nia asocio bezonas vin, ĉiujn el vi, ĉefe novajn homojn, kiuj venos kun novaj ideoj. Ĉiuj talentoj estas bonvenaj, eĉ se vi estas komencanto, ne hezitu kandidatiĝi al la Komitato.

Ni atendas vin en Manosque. Venu multnombre.

Pierre Oliva

REGIONA EKZAMENESIO la dimanĉon 6an de junio

en MARSEILLE, Collège Pasteur, 48 bd Paul Claudel (9ème) métro Dromel

08:30: bonveniga kafo, aliĝoj

Unuagrada ekzameno:

09:00 - 10:00: skriba parto (diktaĵo, respondo al demandoj pri teksteto, gramatiko)
Ekde la 11a: parola parto (legado, respondo al demandoj, priskribo de bildo, ciferoj)

Duagrada ekzameno:

09:00 - 09:40: gramatika testo
10:00 - 12:00: skriba parto (resumo de aŭdita teksto, demandoj pri skriba teksto; 300vorta verkaĵo)
ekde la 14a: parola parto (priskribo de bildo, simplaj demandoj pri la movado, diskuto pri iu temo)

Triagrada ekzameno:

09:00 - 12:00: detraduko kaj altraduko (kun helpo de PIV)
14:00 - 17:00: verkaĵo pri unu el la 4 libroj.
17:00 tuja traduko de aŭditaj frazoj; demandoj pri la libroj.

Ĉar la kvartalo estas dezerta dimanĉon, vi estas invititaj porti vian piknikon por tagmanĝi surloke.

Por faciligi la organizon, bonvolu anonci vin al Renée Triolle, Bello Bauco, 694 chemin de la Civade Verde, 13600 La Ciotat, 04 42 71 42 74 aŭ triole.renee@wanadoo.fr

TEMOIGNAGES de PARTICIPANTS

Si de nombreuses rencontres ou stages ont lieu l'été, bien peu se déroulent en hiver. C'était le pari, un peu fou du groupe de Saint-Raphaël avec Monique et Laurent Prezioso puis Christine Grayssaguel de proposer des cours de haut niveau avec des enseignants étrangers, à une période où fleurissent les mimosas. Certains participants sont devenus «accros», et il a fallu, cette année, limiter le nombre d'amateurs.

I.

Le Club Esperanto St Raphaël-Fréjus a organisé, pour la 4ème année, la semaine espérantiste méditerranéenne dans un cadre très agréable à Agay.

70 Participants de 10 nationalités: Allemands, Anglais, Belges, Espagnols, Hongrois, Japonais, Néerlandais, Polonais, Russes et Français se sont retrouvés à l'hôtel Le Renouveau. Ils ont été chaleureusement accueillis par les organisatrices : Christine et Monique ainsi que par le directeur du Renouveau qui a offert le verre de l'amitié.

C'est dans une ambiance de simplicité, de fraternité, de découverte, que les participants ont pu avec leurs trois animateurs découvrir, consolider et enrichir leurs connaissances de la Langue Internationale Esperanto.

Rafael Mateos Espagnol, dynamique, à vraiment enthousiasmé ses «élèves» pour qui l'apprentissage de l'Espéranto a été un jeu plaisant et passionnant.

Le Britannique Malcom Jones, plein d'humour, d'une grande simplicité, a guidé son groupe vers une meilleure capacité à s'exprimer oralement.

Dans le troisième niveau, la Hongroise Katalin Kova'ts, aussi vive et enjouée que compétente, a entraîné son groupe à approfondir sa connaissance de l'espéranto à travers «la vie et les oeuvres de Vincent Van Gogh». A ce riche programme tourné vers l'étude de l'espéranto il convient d'ajouter les conférences, visites des curio-

sités régionales, balades..... ainsi que les animations proposées par l'hotel.

Rose-Marie

II

Paŭlo rakontas al ni:

Dum la pasinta jaro 2009, amiko mia tre favore parolis pri staĝo en Agay. Tre impresita de liaj komentoj mi revis, ĉu mi povos iun tagon ĝui la etoson?

Ĉar mi laboras deĵorante en fabriko, mi ne povas ferii laŭ mia volo, tiel mi devas atendi la koincidon de staĝo kaj ferio. Feliĉe 2010 estis la jaro kiam plenumiĝis mia revita sopiro.

Per buso, aviadile kaj trajne mi atingis Agay-n. Esperantistoj akceptis min, eĉ en sia hejmo, ĝis la momento iri al la staĝejo. Mi trovis tie esperantistojn emaj koni min, scii pri mia deveno, pretaj helpi min. Dum la semajno, mi havis kursojn zorgitaj de kleraj esperantistoj, pretaj ampleksigi miajn esperanto-konojn, mian kulturon. Eĉ post bonegaj matenmanĝoj, tagmanĝoj kaj vespermanĝoj, en liber-tempaj momentoj mi spertis ĉiutagajn konversaciojn. Kafumado, prelegoj, ekskursoj, dancoj, amemaj vizaĝoj ĉiam. Ekde la mateno, eblis ĝui la maron, la marbordon, aŭskulti mevojn, ŝenti la fraĵon de la vento sur sia vizaĝo, aŭskultante kaj vidante ŝaŭmajn ondojn. La vetero estis varia, ĝi spegulas la evoluon de la animo, suno, pluvo, vento ... ĉio fortigas la amikecon kaj alproksimiĝon de Esperantistoj.

Esperantan vivon mi sopiris kaj en Agay mi trovis.

Kiel la aliaj mi jam sopiras je proksima eblo ĝui esperantistecon en nia Esperantujo.

Amikoj, provu Agay kaj vi ĝuos, eĉ neniam vi forgesos tiun ĉi paradizon!

Paŭlo – marto 2010

Kursoj: Intensiva staĝo en Le Castellet (83) la 23an kaj 24an de januaro. Malgraŭ la malvarmo, kelkaj kuraĝuloj aliĝis al tiu 10hora staĝo, kiu permesas kompreni, kiel funkcias la lingvo, al kio ĝi utilas, kiel uzi ĝin. La partoprenantoj akiras nivelon A1 de la eŭropa Referenckadro kaj povas mem daŭrigi la studadon.

Natura leciono: kadre de Freinet-Movado, MarieHo el Ceyreste (13) gvidis provlecionon antaŭ siaj gekolegoj de Bouches-du-Rhône, elektante humuran frazon en esperanto (lingvo nekonata de la ĉeestanta instruistaro) por klarigi, kiel instrui «nature».

Konversacia staĝo okazis la 20an de marto en Manosque por plibonigi la parolkapablon de la organizantoj de nia printempa rendezvuo

Kurso pri tradukado estis proponita la 13an de marto de Réinsertion et Espéranto. Se radikoj similas en esperanto kaj en franca lingvo, la dirmaniero komplete malsimilas, kaj tio kreas problemojn dum tradukado.

Ekstera agado: Renée partoprenis preparkunvenon pri partopreno de La Ciotat en la eŭropa evento «Marseille 2013» kun demando pri la lingvo-politiko de la organizantoj (ĉu uzi nur la anglan apud la franca, kaj tiel kontraŭstari la leĝon Toubon de 2004 pri uzo de fremdaj lingvoj), kaj propono pri esperantigo de la TTTejo kaj aranĝo de kolokvo pri «Lingvoj kaj kulturoj de la Mediteraneo».

Kulturo: Kiel enŝovi esperanton, kiam evento rilatas al lingvo? Ekzemple, kadre de Festivalo de Dividita Poezio, en La Ciotat, poeziaĵoj de Marjorie Boulton surprizis kaj entuziasmigis la aŭskultantojn, kiuj miris pri la belsoneco de la lingvo kaj malkovris, ke ekzistas poezio en la internacia lingvo.

Kadre de la Jaro de Alproksimigo de Kulturo, Esperanto-la Ciotat prezentas ĉe ClipArt, avenue Dulac ekzpozicion ĝis la 30a de aprilo. Eblas vidi teksaĵon el Kongo,

arbon el papero, kies folioj estis desegnitaj de brazilaj infanoj, pentraĵojn laŭ diversaj teknikoj el Rusio, Kroatio, Ukrainio, Japanio, Barato plus ekspozicio de JEFO pri Esperanto!

Okaze de la **Internacia Tago de la Patrino Lingvo**, la 21an de februaro, Esperanto-la Ciotat kunigis en le Grand Portique lingvo-amantojn, kaj unuafoje aperis Rusino, dum eblis kompari la anglan parolatan de Britino kaj tiun parolatan de Usonanino. Ankaŭ aŭdiĝis la portugala (el Portugalio, Brazilo kaj Mozambiko), la sicilia, la itala kaj la malta!

NEMOVADA ANGULO

Kiel antstaŭigi sukerojn? Comment remplacer le sucre?

A la une, la *stevia rebaŭdiana* interdire en France jusqu'à l'an dernier, fait son apparition. De 100 à 300 fois plus sucrée que le sucre ! 2 à 3 feuilles suffisent pour sucrer votre café. Pourtant (voir n°96 de «Plantes et Santé», nov.2009) ce n'est pas l'emploi tout simple des feuilles séchées qui est autorisé, mais «on fait une tisane de feuilles, on la mélange à de la chaux, on la combine avec deux sortes de résines de polymères pour blanchir le produit et isoler la molécule active, puis on extrait le rébaudioside A avec l'éthanol avant de le lyophiliser pour obtenir des cristaux!» ouf! Pourquoi faire simple? Sinon pour faire plaisir aux multinationales Coca ou Pepsi qui étiquèteront «sans sucre et sans aspartame»?

Nous avons demandé à notre ami Delagneau de Saint-Jeannet de nous en parler.

La *stevia rebaŭdiana* estas vegetaĵo konata delonge en Sud-Ameriko. La Indianoj de Paragvajo, Brazilo, Argentina uzas ĝiajn foliojn kiel suker-surogaton depost jarcentoj. Sed estas botanikisto Bertoni, kiu en 1887 konatigis ĝin en la okcidenta mondo.

La folioj entenas *stevioside* je 100 ĝis 300foje pli dolĉa ol sukero. Sufiĉas 2 aŭ 3 folioj por dolĉigi te- aŭ kaf-tason.

Ĝis 2009, tiu plantkultivado estis malpermesita en Francio, sendube pro la truda influo de la sukerindustriistoj.

Antaŭ kvar jaroj mi aĉetis ĉe Semoj Baumaux kelkajn semojn kaj sukcesis ĝermigi tri. Bedaŭrinde nur unu kreskis normale kaj mi povis gustumi ĝiajn folietojn tre dolĉajn kun gusto de glicirizo. Floroj tre malgrandaj aperas malfrue, dum aŭtuno. Vintre, pro frostoj, ĉio malaperas por rekreski dum aprilo-majo.

Japanio, en la jaroj 70 malpermesis la sintezajn dolĉigilojn (*aspartame...*) kaj uzis *stevia-n* por anstataŭigi ilin.

Zero-déforestation: estas unu el la agadoj de asocio, kies sidejo estas en Cadenet (84): aĉeti terenojn sur kiuj vivas Indianoj por ke ili daŭre vivu en la arbaro kaj dank'al la arbaro.

Tiu asocio Arutam, ankaŭ organizas vojaĝojn en Sud-Ameriko por malgrandaj grupoj, kiuj deziras konatiĝi deproksime kun la Indianoj kaj iliaj vivmanieroj.

<http://arutam.free.fr>

<http://www.zero-deforestation.org>

arutam@free.fr

Pasporta Servo 2010 est paru.

Cet annuaire regroupe quelques 1450 adresses de chambres gratuites chez l'habitant dans 91 pays. Le moyen idéal pour voyager à petits prix mais surtout connaître un pays de l'intérieur. En entrant chez les gens, en discutant avec eux (en espéranto, bien sûr), en partageant un moment de leur vie ou leurs préoccupations; vous appréhendez mieux la réalité d'un pays.

Quant à celui qui héberge le visiteur, il reçoit le monde entier sans bouger de chez lui. Dans notre région, des espérantistes d'Avignon, Gap, Guillaumes, La Ciotat, Le Castellet, Marseille, Nice, Orange, Toulon ouvrent grand leurs portes.

Prochaines rencontres

Inscrivez-vous vite au Congrès d'Espéranto-France, en Allemagne, avec les Allemands, à Kaiserlautern (nombreux trains au départ de Strasbourg).

info@esperanto-france.fr

www.esperanto-france.org

Beneluxa Kongreso 2010: «Lingva prismo en Benelukso» 13-16 majo en Antverpeno

www.esperanto.be/kongreso

27 avril - 1er mai : espéranto du point de vue mathématique (présentation de la langue, opérations en espéranto, poésie et flûte de pan). Inscriptions par internet:

kastelo@gresillon.org ou www.gresillon.org

Rusia Esperantista Kongreso en Sankt-Peterburgo de la 27a ĝis la 31a de majo

www.reu.ru — kongreso@reu.ru

BET-46: Baltia Esperanto-Tagoj en Visaginas (Litovio/Lituanie) de la 26a de junio ĝis la 4a de julio

Kaj por pli studemaj ferioj, pensu pri la kastelo de Grezijono (17 hektara parko, por la tuta familio) dumsomere, Sète-le Lazaret por la tuta familio, taŭgas por rulseĝoj, fine de aŭgusto; Bouresse apud Poitiers; ktp...

Se vi jam pensas pri kristnasko, en decembro 27a IF en Nördlingen (Germanio)

www.internacia-festivalo.de

VIZITO DE LUD-MUZEO en Svislando apud Lausanne la 6an de junio je la 15a.

Tiu muzeo de la ludoj kaj ludiloj en La Tour de Peilz ĉe la Lemano-lago uzas esperanton. Komuna vizito estas organizita por esperantistoj la 6an de junio (se vi ne trapasos ekzamenojn ...)

www.museedujeu.com

cescoreale@gmail.com

**NE FORGESU VIZITI NIAN BLOGON;
INVITU VIAJN GEAMIKOJN
VIZITI ĜIN;
KONTRIBUUI**

<http://esperanto.provence.free>

**ASSEMBLEE GENERALE DE ESPERANTO-PROVENCE
CONVOCATION**

Vous êtes convoqué à l'Assemblée Générale d'Espéranto-Provence
qui se tiendra à **Manosque**
Maison des Associations
209 Bd du Temps Perdu
dimanche 9 mai à 9.30

Ordre du Jour/ Tagordo

1	bienvenue/ bonvenigaj vortoj
2	rapport moral / morala raporto (Pierre Oliva)
3	rapport d'activité /agadraporto (Michel Cerisay)
4	rapport financier /financa raporto (Michel Cerisay)
5	rapports des groupes locaux /sinprezento kaj raporto de la lokaj kluboj
6	élections au CA /elekto de la komitatanoj
7	information / informado
7.1	au public / ekstera : blog, enquête d'opinion
7.2	interna : bulteno , blogo, retlisto
8	culture : Marseille 2013
9	enseignement /edukado : kursoj kaj staĝoj
10	diversaĵoj

**ASSEMBLEE GENERALE DE ESPERANTO-PROVENCE
CONVOCATION**

Bonvolu resendi al Michel Cerisay
15 Place des Vents Provençaux - 13 140 MIRAMAS

- Je participerai à l'Assemblée Générale
- Je ne participerai pas à l'Assemblée Générale d'Espéranto-Povence
et donne pouvoir

Je, soussigné (nom)..... donne pouvoir

à.....pour me représenter lors de l'Assemblée

Générale d'Espéranto-Povence à Manosque le 9 mai 2010.

Manskribu kaj subskribu / écrire à la main « bon pour pouvoir », dater et signer.

- Je suis candidat au Conseil d'Adminsitration d'Espéranto-Provence / mi
kandidatiĝas al la Komitato de Esperanto-Provence

Je m'intéresse particulièrement à / mi ĉefe interesigas pri

Printempa Rendevuo en Manosque , la 8an kaj 9an de majo

Maison des Associations, 209 bd du Temps Perdu

Kial veturi al Manosque?

- por paroli la lingvon kaj praktiki ĝin;
- por pli bone koni Rusion, la nunan, la ĝisnunan, la lingvon, ktp kun Renée Triolle;
- por kulturigi pri rolo de esperanto laŭ psikologiaj sekvoj kun Claudie Demongeot;
- por vidi monumenton al Zamenhof, dimanĉe posttagmeze;
- por aŭskulti koncerton en esperanto far Franz Mimmersheim;
- por aktive partopreni la regionan esperanto-vivon;
- por diskuti pri viaj problemoj aŭ sukcesoj;
- por fari proponojn kaj interŝanĝi.

Eble la horaro modifiĝos se la urbestro akceptos nin.

Ni provis organizi ne tro multekostan aranĝon: komuna pikniko sabate tagmeze (plej amuze estas porti ion kaj dividi kun la aliaj ol manĝi propran sandviĉon en sia angulo!), propono manĝi ĉe Flunch. Por tranoktado ni proponas al vi hotelon Bel-Alp, proksiman de la kongresejo (vi mem zorgos 04 92 72 66 82), kaj evidente ni invitas vin veturi per komuna transportilo aŭ kunveturi per aŭto.

Aliĝu sufiĉe frue por helpi la organizanton, José Grammatico, kiun ni dankas.

Ni memorigas, ke partopreno en la Membro-Kunveno estas senpaga; partopreno en la staĝo kostas 15 eŭrojn (25 por paro)

Sabate	ekde la 9a	Akcepto / accueil
	de la 10a ĝis la 12a	Konversacia rondo aŭ (laŭ via elekto) prezento-diskuto pri Rusio / conversation ou Russie
	ĉirkaŭ 12:30	Komuna manĝo ,eltrita el la sako (aŭ vi iru al restoracio laŭ via plaĉo) / repas tiré du sac
	de la 15a ĝis la 16.30a	Konversacia rondo aŭ prezento de Claudy Demongeot / conversation ou « réinsertion »
	de la 16.30 ĝis la 18a	Rusio / Russie
	ĉirkaŭ 19:30	Komuna vespermanĝo proponita en Flunch / repas
	20:30	Koncerto de Franz Mimmersheim en Maison des Associations
Dimanĉe	09:30	Membrokunveno (vidu la tagordon dorse) / Assemblée Générale (ordre du jour au verso)
	15:00	Vizito de la urbo (visite de la ville dont Monument à Zamenhof)

ALIĜILO al la PRINTEMPA RENDEVUO—MANOSQUE , 8an de Majo 2010

Mi aliĝas al la printempa rendevuo kaj pagas 15 eŭrojn .

Je participerai aŭ rendez-vous de Printemps et paye 15 euros .

Nomo:

Propra noma:

Adreso:

Retadreso:

Telefono :

Mi partoprenos la konversacian rondon / Je suivrai le cours de conversation
 la prelegojn / les conférences

Je contribuerai au repas de midi et porterai

Mi pagas 15 eŭrojn kun ĉeko al Esperanto-Provence, kiun mi sendas al
Michel Cerisay - 15 Place des Vents Provençaux - 13140 MIRAMAS